# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 22/07/2021 Kvincentkvardeka eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 810,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **279,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **228,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **201,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **102,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde decembro 2021)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 44 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En la subfrazo de la kombinita propozicio (= frazo) "En la dek minutoj, dum kiuj la manĝema knabo rapide manĝis la kukon", li sukcesis manĝi la tutan kukon kun gusto", A) kio estas la gramatika subjekto kaj B) kia frazparto estas la vorto "rapide"?

2). En la ĉeffrazo de la kombinita frazo en N.ro 1), A). kio estas la gramatika subjekto, kaj B). kia frazparto estas "kun gusto", kaj C). kio estas la gramatika objekto, kaj Ĉ). kio estas la predikato?

3). En la frazo "Dum dek jaroj li ĉiam estis fidela amiko, kiun mi ĉiam povis fidi" kiel oni nomas la vorton "kiun" kaj kiel la vorton "amiko"? Kaj kiu parto estas la ĉeffrazo?

4). En la kombinita frazo en N.ro 3) kiel oni nomas la frazparton "fidela amiko" kaj kiel oni nomas la frazparton "estis fidela amiko"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 540 *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***




## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



Esperanta Retradio

Aktualaj problemoj de la perŝipa vartransporto **15a Julio 2021**

**3ZZZ**.... En la elsendo de la 19a de julio 2021 pere de intervjuo Helen Palmer klarigas kial multaj australianoj havas la senton ke ili neniam renkontis aborigenajn homojn . Vi ekscios kial la nacieco de Mozart problemas . Ĝi enhavas ankaŭ kelkajn anoncojn . *Franciska Toubale*



# " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas kiel legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

***Google Translate*** estas bonega tradukilo por vortoj anstataŭ uzi vortaron. Metu la ligon sur vian ekranon.

## INUNDO! Ŝtormegaj problemoj en Okcidenta Aŭstralio



La antaŭlastan Vendredon ni inundiĝis dum ŝtormego. La malsupra parto de nia dunivela domo fariĝis lago!. Ĉiuj el la tapiŝoj kaj la sub-tapiŝoj, inkluzive de tiuj en la "avinjo-dometo" devis esti forigitaj, kaj ni suferis dum ok tagoj la (ekstreme laŭtan!) bruon de 5 grandaj ventumiloj kaj 5 akvovaporo-suĉiloj (kondensiloj) tra la domo. Hodiaŭ (lundon) la naŭan tagon, oni mezuris la humidecon kaj trovis ĝin ankoraŭ tro alta, do, venis en la domo 6-a granda ventumilo, kaj necesas, ke la tuta ekipaĵo daŭrigu sian laboron ĝis la fino de la semajno. Ho niaj kompatindaj oreloj! Sed povus esti pli grava afero...ni almenaŭ ne loĝas en Okcidenta Germanio kie lastan semajnon okazis la katastrofo kun perdo de domoj kaj vivoj. *Vera Payne*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# La juliaj prelegoj organizitaj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio



Kiel planite okazis du prelegoj je la 3a dimanĉo de la monato: unu de Stefan MacGill, kies Amo seminario famas en ĉiuj kontinentoj kaj la alia de Fukuda Toshiro. Ni malkovris Toshiro-n, la magiisto , muzikisto, en unu vorto , la artisto. Lia magio estas simpla sed amuza kaj ridigis la rigardantojn . Kortuŝa estas la fakto ke Toshiro vojaĝis al multaj orfejoj en Etiopio , Afganujo kaj rifuĝejoj, en Sirio, Irano ktp. por distri la tieajn vivantojn . Plaĉas al mi la penso ke same kiel ni hieraŭ, multaj homoj, kiuj devas elteni malfacilan vivon, forgesis siajn zorgojn dum horo aŭ pli. Gratulon al Toshiro, kiu kapablas aperigi rideton sur la vizaĝojn de tiom da homoj junaj aŭ maljunaj. *Franciska Toubale*

# La esperanto-tiparoj

Ne forgesu ke la "informaj paĝoj" numero 540B montras ankaŭ solvojn pri tiu problemo.

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*



# Diskutkapablo malgraŭ multaj eraroj.

## ALTERNATIVAJ EKZAMENOJ.

Se fremda enmigranto scias sufiĉe de la angla lingvo por klarigi en hotelo kion li deziras, sed dum tio faras multajn anglajn erarojn, ni malsukcesigas lin en konvencia ekzameno ĉar en ekzamenoj oni serĉas la erarojn kaj ne la bonan parton. Trovi kaj kalkuli ilin estas multe pli facila laboro ol trovi kaj kalkuli la seneraran parton de la uzata lingvo. Do la enmigranto malsukcesis en ekzameno sed sukcesis en la praktika uzo kaj komprenebleco de la lingvo. Dungisto agas laŭ la sukceso en la ĉiutaga uzado. Por scii la kapablon en la ĉiutaga vivo, do ekzistu alispecaj ekzamenoj, kvankam tia ekzamenado kostas pli da tempo.

Antaŭ kelkaj jardekoj la Ekzamena Komitato de la Aŭstralia Esperanto-Asocio konsciis pri tio kaj kreis alternativajn ekzamenojn en kiuj oni ne juĝis la erarojn, sed nur la ĝustan parton. La Ekzamena Komitato oficialigis la trigradajn alternativojn kaj do oferis ses specojn de ekzamenoj. La alternativaj estis tre popularaj, ne ĉar ili estus pli facilaj sed ĉar oni scias ekzakte kiuj mil vortoj troviĝas en la ekzameno kaj kio de la gramatiko estas uzata. Se oni do lernas la mil vortojn, sen escepto, kaj la bezonatan gramatikon menciitan en la gvidlibreto, oni ne povas fari iujn ajn erarojn. Tial la sukcesrezulto bezonas 80% da ĝustaj vortoj kaj gramatiko, ne 100% ĉar homo povas ĉiam havi iomete da malĝustaj momentoj. Unu aŭ du kandidatoj argumentis, ke 50% da ĝusto devas esti sukceso, sed tio ne validas en ĉi tiu speco de ekzamenoj. Dum la ekzamenoj, kiuj okazas supervidate, oni ne rajtas enporti aŭ ĉehavi iun ajn tekston, nur la blankajn paperojn donitajn de la ekzamenisto. Malgraŭ ĉi tiuj striktaĵoj ĉiujare preskaŭ ĉiuj ekzamenatoj sukcesis, simple ĉar ili sciis la mil vortojn kaj la donitan gramatikon.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

La demandataj ekzamenpartoj estis similaj al la malmodernaj ekzamenoj. La ekzamenistoj poste ne serĉas la erarojn, kaj lasas ilin ne traktataj. Ili kontraŭe nur serĉas kaj kalkulas la ĝustaĵojn, kvankam nur unu aŭ du fojojn. Por tio ili bezonas multe pli da tempo. Por sukcesigi la ekzamenaton ili scias kiom da bonaĵoj bezonatas en ĉiu parto de la ekzameno. En la ekzamenoj uzatas nur la 1000 vortoj. Por doni ideon de la formo de la ekzamendemandoj, mi donos en la venontaj A.E.-oj unu aŭ du ekzamendemandojn. Ĉar ekzistas tri niveloj, miaj ekzemploj prenatos el la "Meza Ekzameno", kies gramatiko estas preskaŭ la sama kiel troviĝas en ordinara lernolibro, kaj la mil donitaj vortoj. Pli ne bezonas esti sciata, ĉar ne estas en la ekzameno. En la Baza Ekzameno troviĝas ducent vortoj kaj facila gramatiko, kaj en la Alta Ekzameno troviĝas eĉ la plej malfacilaj gramatikaj problemoj kaj ĉiuj oficialaj vortoj Fundament'aj. Eble en la estonto mi montros kelkajn demandojn de la Alta Ekzameno, kiujn la plej kleraj aŭstralianoj trovos malfacilaj. *Marcel Leereveld.*

**LEĜA AŬ OPINIATA KULPO.**

Se okazas aŭtoakcidento, tio kaŭzas malutilon al iu kaj en plej multaj kazoj iu kulpas, kaj punatas. Se Aŭstralio partoprenas en laŭ ni nenecesa eksterlanda milito, tio estas akcidento kiu kaŭzas malutilon al iu, kaj la kulpulo de la militpartopreno punatu laŭ ni. Tiu kulpulo estas aŭ la ĉefministro aŭ tiuj kiuj elektis lin aŭ ŝin. Puni la elektintojn estas neebla, ĉar la elektado estas sekreta. Ni do povas nur diri kion ni pensas pri la kulpeco, kaj kiujn ni opinias punindaj kaj kulpaj kaj respondecaj. Antaŭ ol iu eventuala kortumkazo okazas, homoj rajtas kaj devas diri publike siajn opiniojn pri krimeco aŭ ne.

Se do okazas iu krimeblo, ekzemple deklari militon, ni devas publike diri ĉu ni opinias tion krimo aŭ ne, jam antaŭ ol iu kortumo okupas sin pri tio. Tial mi deklaras ke en mia opinio tiuj homoj kiuj eletis ĉefministron kiu laŭ ni nenecese partoprenas en la eksterlandaj militoj en Irako, Afganujo, kaj Vjetnamujo estas respondecaj kaj kulpaj pri krimo. Same kiel oni faras pri Krimoj kontraŭ la homaro". Mi do konsilas al niaj legantoj, deklari publike ke laŭ via opinio ĉefministroj kaj aŭstralianoj kiuj voĉdonis por ili kulpas pri la eventuale en kortumo decidota kaj puninda krimo fari militon nenecesan por la defendo kaj bonfarto de la aŭstralia ŝtato. *Marcel Leereveld.*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**SOLVO DE LA KVIZETO 42**

1). A). "la manĝema knabo". B). Adjekto.
2). A). "li", kaj B). Adjekto, kaj C). "la tutan kukon", kaj Ĉ). "sukcesis manĝi".
3). "kiun" = rilata pronomo kaj "amiko" = antecedento. La ĉeffrazo estas "Dum dek jaroj li ĉiam estis fidela amiko".
4). "fidela amiko" = predikativo; "estis fidela amiko" = predikato. *Marcel Leereveld.*

# Universala baza enspezo (UBI)

**Por pli kontentiga kaj sekura mondo**



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***